# INTER★NI

estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 204 — Aprilo 2003

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:
Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas $8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas $15

## La Redaktoro Prokrastas

Denove mi devas pardonpeti pro tio, ke la apero de ĉi tiu numero malfruas. Estas diversaj kialoj. Unue, mi konstatis ke oni mallongigis la daŭron de ĉiu horo. Ĉu vi jam notis tion? La horoj ekkuregas tra la tagoj tiel rapide, ke mi apenaŭ povas noti la ekziston de nova horo antaŭ ol ĝi perdiĝas. Eĉ pli rapide ili malaperas tra la noktoj, kaj mi ne povas sufiĉe frue enlitiĝi por tute refreŝiĝi antaŭ la frua komenco de nova labortago. Kaj ne parolu pri la semajnfinoj. Jam malfrue ĉiun vendredon mi sentas la rapide alvenontan finiĝon de la semajnfino, kaj mi ankoraŭ faris nenion. La semajnfinoj ŝrumpas! Due, oni eĉ forŝtelis tutan horon el antaŭnelonga semajnfino - sen pardonpeto kaj sub nokta mallumo. Diable! Kiel oni povas regajni la kutiman vivoritmon sub tiaj kondiĉoj? Trie, la liberaj horoj pleniĝas per teruraj temoj en ĉiu tagĵurnalo kaj televida novaĵraporto kaj en ĉiu konversacio. Oni jam perdis multan tempon pensante pri la kialoj por la milito en Irako, kaj pri la eventualaj rezultoj.

Tamen, dank' al la kontribuinto por ĉi-tiu numero, S-ro Navin Lal Shrestha el Nepalo, mi ĝojas povi prezenti inter ni informon pri fora al mi lando. Navin unue kontaktis min ofertante artikolojn pri sia lando, kaj li afable aldonis eĉ plian informon pri sia landa organizaĵo. Mi multe dankas lin.

Kaj anticipe, kara leganto, mi dankas al VI pro VIAJ aperontaj kontribuaĵoj.

— la redaktoro

## AKVOFONTOJ EN NEPALO

Multe da naturaj varmaj akvofontoj ekzistas en Nepalo. Se oni banas sin en tiuj ĉi fontoj, oni kuracas paralizojn kaj malsanojn de ventro kaj haŭto senpage kaj sen malbonaj efikoj.

Naturaj akvofontoj estas kvazaŭ hospitaloj de naturo. La temperaturo de tiuj fontoj etendiĝas de 0° ĝis 100°C. Ofte la nepalanoj nomas lokojn kun akvofontoj Tatopani ('tato' signifas en la nepala lingvo 'varma', kaj 'pani' 'akvo').

Naturaj, varmaj akvofontoj troviĝas ekzemple en Kodari, Hatijana (Sankhuvasava distrikto), Sjabrubesi kaj Ĉilime (Rasuva distrikto), Bhurung, Dokhola, Singa, Ĉumrung kaj Dhadkharka (Mjagdi distrikto), Ĝomsom kaj Dhima (Mustang distrikto), Ĉame kaj Lata (Manang distrikto), Vulvule Khar (Tanahu distrikto), Tatopani (Baĝhang distrikto), Dhanĉauni (Luma) kaj Tila rivero (Ĝumla distrikto), Ŝrinagar, Sina kaj Ĉamalaija (Darĉula distrikto), Riar, Sadhu Khola kaj Saraj Khola. Estas multaj akvofontoj en aliaj lokoj en Nepalo, sed ili estas konataj nur al lokaj homoj.

El ĉiuj akvofontoj, Tatopani en Kodari estas la plej fama. Kodari situas preskaŭ 200 km norde de Katmanduo, apud la limo inter Nepalo kaj Ĉinio. Multaj homoj iras ĉiujare al Tatopani en Kodari. Ili banas sin en ĝia varma, natura akvo ĝiskontentiĝe.

— Navin Lal Ŝrestha

## LA JETI-O



Se vi deziras vojaĝi en la regiono de Everesto, kiu estas la plej alta monto de nia mondo, kaj se via ŝanco estas tre bona, vi vidos jeti-on. Kio estas jeti-o? Kie oni vidos ĝin? Kaj kiam?

Jeti-o nur ekzistas en la himalaja regiono en la norda kaj tre alta parto de Nepalo. Sed oni ne ĉiam vidas jeti-on. Jeti-o estas besto kiu aspektas preskaŭ same kiel gorilo. Ĝia torso estas tute kovrita per haroj. Ĝiaj manoj kaj piedoj havas po kvar fingrojn. Ĝi estas pli granda kaj pli alta ol homo, kaj pli forta. Ĝi manĝas poefagojn, bovajn bestojn troveblaj nur en Himalajo.

Oni ne ĉiam vidas jeti-ojn, kaj kien precize oni iru por vidi ilin, neniu scias. Sed homoj vidis jeti-ojn preskaŭ dudek fojojn. El tiuj, kiuj vidis jeti-on, multe malsaniĝis. La patro de Tenzin Norgej Ŝerpa, kiu kiel unua surgrimpis Evereston (kun Edmund Hillary), malsaniĝis post kiam li vidis unu el ili, kaj post dek tri tagoj li mortis.



Oni ne sukcesis ĝis nun fotografi jeti-on. Sed multaj homoj vidis piedspurojn de ia jeti-o. Oni trovis tiajn piedspurojn pli facile ol jeti-ojn mem. Kompreneble, la piedspuroj ne estas tiel danĝeraj kiel la besto. Oni jam multfoje fotografis piedspurojn.

Multaj homoj ne kredas pri jeti-oj kaj diras, ke oni vidas ilin nur en sonĝoj - tio estas, oni imagas ilin. Sed aliaj kredas, ke jeti-oj vere ekzistas, kvankam oni ne povas diri kie ili troviĝas aŭ kiam ili aperas. Ĉiuokaze, ili tre malofte aperas. La ŝanco devas esti tre bona por vidi ĝin. Se vi volas iri al la Everesto-regiono kiel vojaĝanto, mi ne scias ĉu deziri al vi tian "bonan ŝancon". Sed se vi havigos ĝin al vi, do revenu hejmen sendanĝere.

— Navin Lal Ŝrestha

## JEN PRI „NEspA"

Nepala Esperanto-Asocio (NEspA) estas fondita en 1991. La esperantistoj de Nepalo kunvenas ĉiuj sabate en NEspA. NEspA kondukas kursojn por komencantoj kaj progresintoj de tempo al tempo. NEspA organizas Internacian Himalajan Renkontiĝon (IHR) ĉiujn du jarojn. En februaro kaj marto 2002 ni organizis Internacian Himalajan Renkontiĝon kiam oni propagandis, ke Nepalo estas maltrankvila. Sed multaj homoj partoprenis kaj iris ĝis la bazoo de la pli alta monto, la Everesto. Venonta Internacia Himalaja Renkontiĝo okazos en februaro-marto 2004. Nepalo trankviliĝas nuntempe, kaj eble multaj homoj partoprenos kaj ĝi sukcesos pli bone.

S-ro Pradip Paudjel estas la unua prezidanto de NEspA. S-ro Tibor Sekelj kaj Simo Milojevic venis al Katmanduo kaj intruis en Katmanduo antaŭ kvardek-kvin jaroj. Ili instruis por pluraj monatoj kaj la novaj esperantistoj fondis la unuan esperantistan organizaĵon, kion oni nomis Katmandua Esperanto-Societo. Tiu organizaĵo sukcesis inspiri la idealismon de la E-movado al siaj membroj tra la Katmandua valo. Bedaŭrinde, la movadaj agadoj ĉesis kiam la plej aktivaj membroj disiĝis al aliaj lokoj pro profesiaj kialoj.

Poste, Joachim Werdin venis kaj instruis. La kursanoj decidis en 1990 organizi oficialan klubon kaj unu asocion por nepalanoj, kaj ili fondis NEspA-n (Nepala Esperanto-Asocio) la 3-an de novembro 1990. Tiam kvindek membroj de la nova asocio elektis s-ron Pradip Paudjel prezidanto. NEspA estis registrita kiel laŭleĝa organizaĵo la 12-an de decembro 1991. Joachim Werdin intruis pli ol okdek lernantojn, per kio plifortiĝis la E-movado en Nepalo. Kun granda plezuro ĝi bonvenigis multajn esperantistojn de la mondo al Nepalo.

***Montejo***, oficiala gazeto de NEspA, ekzistas ekde junio 1992. Sep numeroj jam aperis kaj disdoniĝis.

— Navin Lal Ŝrestha, GPO Box 11753, Kathmandu, Nepal.